

Usona Esperantisto № 2020:1 (jan-feb)

Anoncoj

Pli da *Riveregoj*; nova bita albumo "Kien vi iros?"; reminder about PER in North Carolina; Alvoko al esperantologia konferenco en Montrealo; Usonano gajnas en filmkonkurso

Esperanto on CBS Sunday Morning media hits

CBS aired a short segment on Esperanto for its program *Sunday Morning*.

Dek gravaj paŝoj

de la prezidanto • Filipino DORCAS

Jes, la Universala Kongreso okazos ĉi-jare en Montrealo! Mi vokas vian atenton al la jenaj paŝoj, kiuj eble helpos vin.

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Zamenhof-tago en Reĝino, Kanado

loke • Bruce ARTHUR

Raporto de nia membro en Reĝino, Saskaĉevano.

Raporto pri VEK

loke • Carlos Pesquera ALONSO

En Januaro, USEJ, la junulara sekcio de Esperanto-USA, gastigis la unuan Vintran Esperantistan Klerigadon (VEK).

Raporto pri SORE

loke • Anna BENNETT

Okazis la unua SORE (Sud-Okcidenta Renkontiĝo Esperantista) en Mesa, Arizono.

Lastatempa agado en la meznorda regiono

loke • Peggy DOLTER

Raporto de nia regiona helpanto por la meznorda regiono.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La sepa en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

Traduku!

traduku! • Hoss FIROOZANIA, Lee MILLER

La orelvermo sukcesis infekti kelkajn legantojn – kaj ili sukcesis traduki ĝin.

Lacas

senintenca esperantaĵo • Margo COHEN

Estas malfacile vigliĝi, se eĉ la kafo lacas.

La ĉefdisciplo de Esperanto

el la arĥivo

Laŭdo al Louis DE BEAUFONT en 1908, aperinte ĝuste antaŭ ol klare evidentiĝis, ke li havis rolon en la Ido-skismo.



Anoncoj


Pli da informo pri UK en *La Riverego*

La Riverego estas la revuo de Esperanto-Societo Kebekia (ESK). En 2019 aperis speciala “mikronumero” pri la venonta UK en Montrealo. Redaktoro Ĵenja AMIS informas, ke ekde tiam aperis **du aliaj mikronumeroj kaj unu plena numero** <<https://bit.ly/3cJje7w>> (1MB PDF-dosiero). Indas esplori ilin, aparte se vi planas partopreni en la kongreso!



Kien vi iros?

Post la unua bita albumo *Flugantaj melodioj* (2018) – klasika gitaro kaj kavakinjo (brazila kordinstrumento) – Rafael MILHOMEM revenas kun *Kien vi iros?* Ĝi estas koncepta kaj instrumenta verko de mondmuziko, kiu donas la ideon ke oni povas vojaĝi tra la mondo per la potenco de menso plibonigita per muziko kaj legado.



La albumo enhavas la faman kanton *Hejmo*, kun teksto de la poeto Marjorie BOULTON, kantita de Kaliene ARAUJO kaj kun la kontribuo de Muniz. Ĝi alvokas sufiĉe densan kaj katastrofan etoson, kaj kongruas perfekte kun peza metalroka etoso.

Por pli da informo, vidu la **retpaĝon pri *Kien vi iros?* ĉe Vilnikosmo** <<https://bit.ly/3360H16>>.

Printempa Esperanto-Renkontiĝo

Don't forget about PER, the *Printempa Esperanto-Renkontiĝo*, which takes place April 24-26 in the mountains of North



Carolina. Thomas Alexander will be this year's instructor-in-residence and activities coordinator. Like last year, PER will be a totally immersive Esperanto experience crafted towards sharpening language skills (comprehension, diction, vocabulary) and having fun doing so.

Further information is available at **the PER website** <<http://esperanto-nc.org/spring-esperanto-meeting/>>.

UEA invitas prelegi en IKU

UEA alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco okazonta ĉe la UK. La ĉi-jara aranĝo pritraktos la temon:



Dulingvismo, plurlingvismo kaj la sociaj bezonoj je efika komunikado.

Kanado estas oficiale dulingva, sed kiom multe en la realo? En pluraj aziaj, afrikaj kaj eŭropaj regionoj, homoj kutime posedas tri-kvar lingvojn je nivelo C1, sed ĉu tio estas dezirinda kaj efika por la cetero de la homaro? Ĉu la Esperanto-movado restu ĉampiono de universala dulingvismo? Jen kelkaj el la demandoj pritraktotaj, ni esperas ankoraŭ trovi pliajn interesajn tiurilatajn temojn.

La kongresaj organizantoj invitas ĉiujn fakulojn, aparte junulojn kaj unufojajn partoprenantojn, sendi proponojn, speciale pri la prezentoj per afiŝoj, kiel eble plej baldaŭ al ek@kulturo.net. La limdato por la proponoj estas la 30-a de Aprilo 2020.

Usonano gajnas duan premion en internacia filmkonkurso



Jes. Do tio ĉi estas el la tria akto,

Atlantano Brandon SOWERS intervjuiĝas dum kluba renkontiĝo ĉe teatraĵo.

Pasintjare, UEA kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI) lanĉis la filmkonkurson *Mia asocio, mia urbo* por

diskonigi Esperanto-asociojn en diversaj lokoj de la mondo, omaĝe al la 55-jariĝo de la Esperanta disaŭdigo de ĈRI. La konkurso sukcesis varbi 35 filmojn pri 30 urboj kaj asocioj en 15 landoj. Laŭ decido de la juĝa komisiono, UEA disdonis la unuajn premiojn (po 500 eŭrojn) al:

- 1-a loko: Minga Guazú, de Alexandra MENDIETA (Paragvajo);
- 2-a loko: Atlanto, Georgio, de Alekso MILLER (Usono);
- 3-a loko: Taŝkento, de Gafur MIRZO (Uzbekio).

La premiita filmo de Alekso <<https://youtu.be/Z595v0AzLoY>> aperas en la Youtube-kanalo de UEA.

Dek gravaj paŝoj

de la prezidanto • Filipino DORCAS

2020 estas la jaro! Nun estas la momento!


Ni ne ofte havas la ŝancon partopreni tian mondiskalan eventon en nia kontinento, tiel proksime al Usono. Jes, la Universala Kongreso okazos ĉi-jare en Montrealo! Mi vokas vian atenton al la jenaj paŝoj, kiuj eble helpos vin. Se vi jam aliĝis por via aventuro en Montrealo dum la unuaj ok tagoj de Aŭgusto, vi rajtas iri rekte al paŝoj 9 kaj 10.

1. Iru al la **retejo de niaj kanadaj najbaroj** <<https://esperanto2020.ca>>. Legu laŭplaĉe pri la evento.
2. Legu la **dokumentojn ĉe UEA pri la kongreso** <<https://uea.org/kongresoj/UK>>. **La Dua Bulteno** enhavas apartan informon pri la hotelo, ekskursoj, datoj, kostoj, ktp.
3. Se vi ne estas membro de UEA, bonvolu **aliĝi per nia retbutiko** <<https://bit.ly/2SI69SI>>. Vi akiros kontnumeron de UEA, kiu faciligos vian aliĝilon al la UK.
4. Plenumu la **kongresan aliĝilon** <<https://uea.org/kongresoj/alighilo>>.
5. En la kongresa aliĝilo elektu **Pere de UEA-peranto en Usono**. Tiel vi vidos la kvanton en eŭroj, kion vi bezonos pagi al UEA.
6. Poste, **pagu ĉe nia retbutiko**

<<https://bit.ly/3bLZlHk>>.

7. Aranĝu pri via tranoktado en la hotelo. Legu plu pri tio en la **Dua Bulteno**.
8. Aranĝu pri via transportado.
9. Helpu aliajn partopreni per via bonkora mondonaco al nia kampanjo, *Esperanto in the USA*. Per tiu kampanjo, ni jam havis eventon por trejni junulojn por esti gvidantoj kaj eĉ gvidi eventojn ĉe la UK! Tio okazis en Ĉikago en Januaro. La kampanjo helpas al junuloj kaj lokaj grupoj. Tio helpos pli da homoj partopreni en la UK en Montrealo. Pli da informo troveblas en nia retejo.
10. Post tio, informu viajn amikojn, ĉu esperantistojn aŭ ne, ĉu en via loka klubo aŭ ne, pri viaj venontaj aventuroj!

Kompreneble, se vi havas problemojn pri la paŝoj, bonvolu kontakti nin en nia centra oficejo de Esperanto-USA, aŭ kontaktu niajn amikojn en Kanado aŭ ĉe UEA.



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

De la estraro

VEKiĝo danke al via malavareco

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

Saluton. Mi bedaŭras la mankon de miaj kutimaj raportoj en la lasta elsendo, sed mi revenas! En Januaro, USEJ, la junulara sekcio de Esperanto-USA, gastigis la unuan Vintran



Esperantistan Klerigadon (VEK), novan eventon por klerigi junajn esperantistojn kaj helpi aktivadon inter junuloj.

La temo de ĉi tiu VEK estis la organizado de junulaj eventoj, kaj dum ĝi, ni multe lernis. Dank' al via malavareco dum nia kampanjo *Esperanto in the USA*, USEJ povis gastigi tiun eventon, doni stipendiojn al partoprenantoj, kaj eĉ venigi instruiston el Eŭropo, kiu estas junulo kun multe da sperto pri la organizado de internaciaj junulaj eventoj.

Pro tio, ni lernis pli pri kiel organizi grandajn kaj malgrandajn eventojn. Ni helpis pri la planado de la junulara programo de la venonta UK en Montrealo. Ni lernis kiel plibonigi VEK-on por venontaj jaroj kaj diskutis la eblecojn kaj respondecojn gastigi pli grandajn junularajn eventojn estonte. Pro vi, ni nun havas pli da junuloj, kiuj pretas (kaj scipovas) organizi mojosajn eventojn. Nome de Esperanto-USA kaj USEJ, mi dankas tiujn, kiuj donacis al la kampanjo por helpi prepari la estontan movadon en Usono.

— Charlotte BURTON

Treasurer's Update

Murray is Treasurer of E-USA. You can contact him at mmmm0320@gmail.com.

Saluton: The financial position of Esperanto-USA has improved as the year has gone along due to reallocating some of our funding which did not reduce our commitment to the goals of 2019. It is a

credit to the Board for its dedication and fiscal restraint. This year was the first in a long time that did not run a deficit. It is anticipated that that 2020 will have similar results.



Our fundraiser, *Esperanto for the USA*, was a marginal success. This was a first-time experience at joining with the Esperantic Studies Foundation (ESF) in a matching arrangement. The money we raised would be matched by ESF up to \$15,000 for a potential total of \$30,000. E-USA collected \$11,595 in donations and with the match ended up with \$23,190. All that is going to programs and has already greatly supported a youth training session in Chicago. We have been invited by ESF to engage in the same arrangement and the Board is considering its fundraising strategy.

My term as Treasurer began July 2018 and Jordon Kalilich will be filling the position right after the Board meeting in March. I knew Jordon as a Board member until he left in July 2019. Later, Jordon took on the responsibility of running the Google Ad Grant for us and has done a great job. I think we are fortunate to have Jordon join the Board once again.

E-USA has come a long way from its kitchen-table operation of the early days (my first membership in the Esperanto League for North America and UEA was in 1974). Each year we have become more sophisticated and that progress will continue as the organization strives to better serve its members. Esperanto-USA has been made strong by the support and involvement of its members—thank you.

I would think the main goal of Esperanto is to improve international understanding. We may be few but we have an ambitious dream. It is important that we stick together and provide encouragement, structure and opportunity to nurture Esperanto in the USA. Your continued membership plays a big part in that effort. Thank you for letting us be a part of your Esperanto life. Ĝis.

— Murray MERNER

Regions, Publishing

Fred is one of the Directors of E-USA. You can contact him at f3meyer@gmail.com.

The regional coordinators met by Zoom during mid January. The Zoom connectivity was provided by the Esperantic Studies Foundation. We discussed a number of issues. One is the quality of the list of local groups. A second was that we need volunteers for regional coordinators in the Great Lakes, Northwest, and West and Pacific regions. Bill Harris Director of the Central Office is acting as the coordinator for these three regions. Please volunteer. A third issue was composition of the regions. Murray Merner has sent a map to the other coordinators and suggested some changes. The remaining coordinators have not responded yet.



The board of Esperanto-USA has taken several actions concerning the Publishing Funds and the Administrator of the Restricted Publishing Fund. These changes came as the result of a proposal by Hoss Firooznia, Editor of the newsletter. The three motions concerning the Publishing Funds which passed the Board unanimously are:

1. Structure of Publishing Funds:

a) The Treasurer shall create a new Endowment Fund known as the “Publishing Endowment.” Interest from this fund will be allocated to the Restricted Publishing Fund.

b) The Treasurer shall transfer \$30,000 of the Restricted Publishing Fund to the Publishing Endowment.

2. Administrator’s Role:

The role of the administrator of the Restricted Publishing Fund shall include authority to contact copyright holders and publishers as a representative of E-USA.

3. Administration of the Restricted Publishing Fund:

Both the Restricted Publishing Fund Administrator and the Board shall be authorized to spend the Restricted Publishing Fund. In the case of the Board, expenditures may be approved by a simple majority vote. In the case of the Administrator, planned expenditures shall be announced to the Board via email to all Board members with a Treasurer’s Grant Request Form, at which point the usual procedure will be followed.

We need to thank Hoss for this proposal. It portends good publications in the future of Esperanto-USA.

— Fred MEYER, III

Esperanto on CBS Sunday Morning

media hits

Narrated by Jane Pauley, CBS television aired a brief story titled *Almanac: Esperanto* on the February 16th edition of its show *Sunday Morning*.



Produced by Robert Marston, the story briefly touches on the language’s history, makes a brief (and apparently irresistible) mention of William Shatner in *Incubus*, and continues to touch on more modern

uses of the language. Duolingo and Esperanto-USA also get a mention.

Online you can watch the **video of the segment (via Facebook)** <https://bit.ly/38VKdcw> and read **CBS’s accompanying web page**

<https://www.cbsnews.com/news/almanac-esperanto/>.

Zamenhof-tago en Reĝino, Kanado

loke • Bruce ARTHUR



Stacey, Sachia, kaj Bruce. Foto de pasintsomere, kiam ili festis *Paralela Universo* en parko, piknikis kaj ludis kroketon.

Bonan Zamenhof-Tagon 2019 deziras al vi la membroj de la Esperanto-Rondo de Reĝino. Nia rondo reviviĝis ĉi-jare. Ĉio komenciĝis en Januaro kiam Bruce CRISP en Otavo kreis Meetup-grupon pri Esperanto en Reĝino, kaj li helpis al Bruce ARTHUR komenci uzi ĝin. Kelkaj homoj aliĝis, kaj Bruce komencis anonci renkontiĝojn, sed sensukcese. Li ankaŭ komencis sendi al la membroj sian bultenon *Reĝina Esperanto Newsletter*.

Duolingo kontaktis la grupon Meetup kaj petis al Bruce okazigi eventojn por la Esperanto-lernantoj de

Duolingo en Reĝino. Oni diras, ke estas proksimume dek lernantoj. Do Bruce anoncis renkontiĝojn kaj tiel li renkontis tri lernantojn, el kiuj du (Sachia kaj Stacey) volis kunlabori por revivigi la rondon.

Sachia komencis anonci siajn renkontiĝojn ĉe Duolingo kaj Stacey anoncas ilin ĉe Meetup. Bruce ankoraŭ faras la bultenon kaj li komencis fari alian, *La Tersciuro*, per Esperanto.

Ni kutime renkontiĝas en kafejo ĉiun duan semajnon por paroli Esperanton. Ni kutime rigardas korespondaĵojn, parolas pri artikolo kaj ludas ludon. Krom la tri aktivaj membroj, ni renkontis du pliajn lernantojn de Duolingo, kaj ankaŭ iu de Meetup interesiĝas. Nia grupo Meetup havas sume 15 membrojn.

Stacey kaj Sachia studas la lingvon per Duolingo. Stacey studas ankaŭ per lernu.net, kaj Sachia aĉetis la libron *Teach Yourself Complete Esperanto*. Bruce ricevas la revuojn *Monato*, *Usona Esperantisto*, kaj *Esperanto*, kaj dividas ilin kun la aliaj. Ni korespondis per Esperanto kun aliaj urboj: Kun Bruce Crisp en Otavo, Wally DU TEMPLE de regiono Viktorio kaj Vaughn SEWARD de Edmontono. Kaj ni korespondis internacie kun Mana en Demokratia Respubliko Kongo kaj kun Takafumi en Japanujo.

En la nova jaro, Sachia kaj Stacey intencas partopreni la Universalan Kongreson en Montrealo. Ĉu ili renkontos vin tie?

Raporto pri VEK

loke • Carlos Pesquera ALONSO

Mia lasta “aventuro” pro kaj per Esperanto vojaĝigis min trans la oceanon. Ĉi-foje ĝi komenciĝis dum IJK-2019 en Slovakujo. Same kiel ĉiujare ekde mia unua IJK en 2016, mi havis rezervitajn datojn por partopreni. Ne gravas, kie ĝi okazas; tien mi iras.

La 75-a IJK devis esti multe pli trankvila evento, post kiam mi deĵoris kiel ĉeforganizanto de la IJK en Badaĥozo. Ĝi estis iom trankvila, sed por mi, aktiva komitatano de TEJO kaj zorganto de aliaj projektoj pri Esperanto, sendube ĝi ne estis ferio. Mi ne plendas pri tio; tiuj, kiuj konas min, bone scias, ke mi eĉ ŝatas la streĉon por helpi nian movadon pli ol mi ŝatas la ripozadon kaj kutiman feriumadon.

Tie mi ekkonis esperantiston: Charlotte, prezidanton de USEJ, la juna sekcio de nia komunumo en Usono. Pro mia sperto pri organizado de eventoj internaciaj, Charlotte volis paroli kun mi kaj proponi ion. La junaj esperantistoj en Usono havas problemon, ŝi diris. Ili volas aktivigi la asocion kaj fortigi la movadon, sed mankas al ili sperto en organizado de eventoj. La grandaj distancoj de la lando kaj la forteco de la angla malhelpas la disvastigon de la internacia lingvo kaj malfaciligas unuigon de aktivuloj.

Charlotte menciis, ke okazos evento pri klerigado, kaj ili serĉas trejniston por ĝi. Unue, mi iom timis diri jes. Mi zorgas pri la medio kaj preferas ne flugi. Malgraŭ tio, Charlotte konvinkis min. Mi akceptis la proponon vojaĝi al Ĉikago en Januaro. (Tiuj, kiuj konas ion pri la urbo, bone scias ke oni ne vojaĝu al tiu malvarma urbo dum vintro!)

Nun tiu aventuro jam pasis. Dum longa semajnfino mi trejnigis aktivajn junajn esperantistojn en loko for de mia hejmo. La sperto estis tre interesa. Ni estis malmultaj kaj estis multaj eraroj en la organizado de la evento mem, sed tio logikas pro la manko de

sperto. Cetere, ŝajnas ke ili nun multe pli konscias pri la komplikaĵoj kaj taskoj de la organizado de eventoj, kaj ili havas pli klarajn ideojn por la junulara programo de UK-2020 en Montrealo.

Sed tio ĉi ne estu la tuta historio de la vojaĝo. La mesaĝo estu multe pli bela kaj, kvankam evidenta, nekonscia. Tiu semajno, kiun mi dediĉis al Esperanto, estis feriaj tagoj, kiujn mi uzis por labori sen ricevi salajron. Ĝi estis gastigado de bonkora esperantisto, kiu tute ne konis min sed diris “JES JA, Karlos’ – gastu ĉe mi.” Ĝi estis emo organizi eventojn por homoj, kiuj dediĉas tempon por realigi la kernajn ideojn de Zamenhof. La vojaĝo estis ekzemplo de la valoro de vortoj kiel *amo*, *empatio* kaj *fido*. La ekzemplo mem ke nia komunumo ne nur vivas, sed brilas. Mi antaŭakceptis lukti kontraŭ la ŝanĝo de horzonoj, dum mia gastiginto Randio feliĉe emis zorgi pri mia sato, aŭ Charlotte kaj Lanĉo klopodis donaci konon al aliaj aktivuloj.

Do, jen ekzemplo de nia esenco. Ne gravas la manko de dormo, ne estas problemo ke oni volonte elspezas tempon por nekonatoj, aŭ ke anstataŭ ferii (festi? Certe ni ankaŭ festis: ni ankoraŭ junas!) ni kuniĝis por lerni. La rakonto de tiu evento ne estu nur tio, ke la junularo de Usono pretas organizi grandajn eventojn (almenaŭ mi tion volas pensi), sed ke la okazo mem jam diras ke ni, esperantistoj, estas pretaj montri ke la mondo plenas de homoj pretaj por helpi la homaron.



Carlos Pesquera ALONSO

Carlos estas sociologo, organizinto de IJK-2018, kaj aktiva en diversaj movadaj projektoj. Li loĝas en Italujo.

Raporto pri SORE

loke • Anna BENNETT



Foto de Larry BENNETT.

De la 7-a ĝis la 9-a de Februaro okazis la unua SORE (Sud-Okcidenta Renkontiĝo Esperantista) en Mesa, Arizono. Organizis ĝin kun lokaj Esperantistoj Tomaso ALEXANDER, kiu venis por gvidi kaj instrui.

Venis al la renkontiĝo (alfabete): Tomaso ALEXANDER, Anna BENNETT, Larry BENNETT, Randall BURNS, Sarona COLLINS, John “Jo-Co” CUNNINGHAM,

Jeanette DILLEY, George PARTLOW, Ren SPIDELL, Aŭtunjo WARD, Nicole WING, kaj kvar lokaj gastoj vizitis dum kelka tempo.

La fratino de Tomaso (kaj ŝia edzo) preparis kaj alportis vere bongustajn kaj eĉ ankoraŭ varmajn manĝaĵojn dum la tuta semajnfino.


La evento ricevis financon subtenon de E-USA kaj kelkaj individuoj, kaj kompreneble de la partoprenantoj mem.

Ĉiuj ĝuis la babiladon, ludojn, instrukciojn lingvajn, manĝaĵojn kaj la promenadon. Kelkaj homoj jam konis unu la aliajn kaj ĉiuj faris novajn geamikojn. Estis 15 partoprenantoj el kiuj estis spertuloj, mez-niveluloj, kaj eĉ nov-bakitaj esperantistoj. Nun ni jam atendas la venontan SORE en 2021, la semajnfino post la piedpilk-konkurso “Super Bowl”.

Lastatempa agado en la meznorda regiono

loke • Peggy DOLTER

En Februaro, ses esperantistoj ĉeestis la monatan kunsidon de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso. Tri mondvojaĝantoj donis raportojn. Duncan CHARTERS kaj Cecily LEE en Januaro vojaĝis al Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Inter aliaj ili instruis klasojn kaj partoprenis Esperanto-kongreson. Cetere, Jerry JOHNSON lastatempe vojaĝis



al Sud-Afriko, kune kun sia edzino Mary, kaj li rakontis al ni pri tiu ferio. Por ĉiuj, tio estis interesa kunveno kaj ni multon lernis.

Poste, ni iomete babilis pri la Universala Kongreso en Montrealo. Nia klubano Duncan estas la prezidanto de la UEA; kompreneble, li kaj Cecily ĉeestos la UK-on. Entute, kvar el ni ĉe la kunveno planas ĉeesti ĝin. Ni esperas vidi vin tie!

Lacas

senintenca esperantaĵo • Margo COHEN



Ĉu bona marko por kafo? Se lacas eĉ la kafo mem, ĉu vere ĝi povas senlacigi trinkanton?

Pro la jena bildo ni dankas nian senlacan serĉanton de esperantaĵoj, Margo COHEN. Ŝi trovis tiun tastenilon en Vaŝingtono.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



La ĉefdisĉiplo de Esperanto

el la arĥivo

Ĉi-foje en niaj esploroj de la arĥivo ni vizitas ege laŭdan artikolon el 1908 pri Louis DE BEAUFRONT, tiam nomata la "dua patro de Esperanto" pro lia vigla subteno de la lingvo. Interese, la artikolo aperis ĝuste post lia sekreta agado en la Ido-skismo, kaj ĉe la fino de la artikolo aperas redakcia noto pri onidiroj, ke li estas efektive la aŭtoro de Ido. Malgraŭ la deflankiga respondo de Beaufront pri "L' Adjuvanto", post nur kelkaj monatoj li konfesis sian rolon en la skismo. —Red.



Foto. farita de F. Trajan, Antibes.

Esperanto faris el la markizo L. de Beaufront unu el la plej konataj homoj en multaj landoj, por ne diri en la tuta mondo. Sed li estas el tiuj personoj, kiuj amas la ombbron kaj sin montras nur kiam ili ne povas fari alie. Eĉ multaj esperantistoj en Francujo lin ankoraŭ ne vidis, kaj nur de du jaroj li konsentis fari oftajn paroladojn. Ĝis tiam li kondukis ĉion: propagandon, societon, revuon, kolosan korespondadon, el sia labora kabineto. Kaj, ĉar li ne volas ke oni disdonu lian portreton, tiu tre konata homo estas aliflanke nekonata.

Pro tio mi pensas ke mi estas agrabla al mia legantaro, farante la sekvantan priskribon kaj biografion de tiu tro modesta homo.

Markizo L. de Beaufront naskiĝis en Parizo. Kvankam

li nun estas kvindekunujara kaj nedireble laciĝis, laciĝas ĉiutage, li ŝajnas havi apenaŭ kvardek jarojn, malgraŭ senhareco, kiu ankoraŭ grandigas sian vastan frunton de pensulo. Ĉio en li restis eksterordinare juna; marŝo, movo, voĉo, rigardo kaj sentoj. Tio frapas tuj kiam oni lin vidas, precipe kiam oni interparolas kun li. Kredeble li parte ŝuldas al tia mirinda konserviteco siajn tre grandajn sukcesojn de parolado kaj sian reputacion de ĉarmisto. Fakte li povus havi dum horoj perfektan atenton de aŭskultantoj, tiel li renkontas intereson kaj simpation, dank' al voĉo agrablega, varma, karesanta, vibranta, tute rimarkinda, kaj dank' al facileco, aristokratika simpleco de sintenado kaj parolo. Li faras la impreson de homo tre bonvola sed ankaŭ energiega. La ordinara, kutima rigardo en li diras la unuan econ, sed ofte flama kaj potenca brilo montras en ĝi la duan. Observemulo divenas ke tiu homo multege suferis, multege ankaŭ batalis, kaj tio estas vera. Kredeble en tiuj suferado kaj batalado kontraŭ sorto malbona li akiris sian frapantan konon de l' homaro kaj la energion eksterordinaran kiun li montris por enradikigi Esperanton ĉie.

Plenvizaĝa, kun brunaj haroj, kaj blonda barbo, kiun li portas pinte ĉirkaŭ la mentono kaj ankaŭ liphare, li estas ordinare pala kun tre blanka haŭto, facile roziĝanta en viveca interparolo. Liaj okuloj estas verde-kaŝtanbrunaj; ripoze la rigardo montras pens esploriston; kiam ĝi sin fiksas sur vin, vi iafoje vidas ke ĝi bonvole, sed reale, fosas en vi por vin esplori. La brovoj rektaj, harmoniaj, estas larĝe apartigitaj kaj havas inter si la du sulkojn de l' pensulo, sed modere. La nazo, iomete agla ĉe la radiko, estas preskaŭ rekta kaj havas la karakterizon de l' spriteco, kaj de l' direktado. La buŝo delikate kaj afable ridetas ĉe l' akcepto de vizitantoj, aŭ dum la interparoloj. Mezekreska, ne pli dika ol ordinare la aktivaj homoj de 30 jaroj, senceremonia kvankam tre bonsocieta, la markizo estas tre facile alirebla kaj tre rimarkinde afabla. El la tuta vizaĝo, kaj mi diros el la tuta persono, venas al observemulo tiu ĉi impresoj, ke Sinjoro de Beaufront estas antaŭ ĉio pensulo, ke, se li agas, batalas, eĉ se li estas energiega kaj persistega, tion li faras, tia li estas, nur per volo kaj por la penso, la ideo. "Nature", diris amiko kiu lin tre bone konas,

“nature li estas artisto, sed la penso lin sklavigis kaj faris praktika *por la aliaj*.” Artisto, jes li estas, aparte la muziko lin altiris kaj li tre volonte kantis, ĝis la tago kiam lia voĉo rompiĝis subite kaj lasis al li nur en la parolo parton de la ĉarmo kiun ĝi havis en la kantado.

The British Esperantist diris pri lia vivo, ke ĝi estis preskaŭ romano. Eble, eĉ certe, sed dolora romano. Estante dekdujara li perdis en tri monatoj siajn gepatrojn; edukite poste de angla avino li de la 16-a ĝis la 18-a jaro perdis du fratojn kaj unu fratinojn pli junajn ol li. Du monatojn poste, li perdis sian avinon kaj restis sen familio. Laŭ formala volo de sia mortanta avino, li, post ŝia enterigo, tuj forveturis Hindujon kun juna kuracisto, kiu lin edukadis kaj instruadis de kvin jaroj, ĉar tiam Sinjoro de Beaufront estis tre delikata, kaj bezonis por sia sano la flegadon kaj direktadon de specialisto.

Unuigante siajn lingvajn trezorojn, la du vojaĝantoj posedis dekkvar lingvojn. Tamen pli ol unu fojon ili estis ĝenitaj de la lingva diverseco. Pri tio, estante en Benares, Sinjoro de Beaufront havis sian unuan penson pri lingvo internacia farebla el la naciaj. Veturinte Afrikon, post vizito de Ĥinuĵo kaj Japanujo, li tie perdis sian akompananton, edukinton kaj amikon, forrabitan de la flava febzo. La postvivinto volis sekvi la mortinton kaj pro tio ne forkuris de la epidemio; kontraŭe li flegadis la malsanulojn kaj mortantajn. Sed la vivo obstinas ĉe homo kiu kuras al la morto. Li do konsentis vivi kaj foriris Amerikon. Kvin monatojn li restis ĉu en la sudo ĉu en la nordo, du nome en Usono, kiun li volonte revidus. Tiam li revenis Eŭropon por sciigi, alvenante, ke dank’ al bankroto de bankiero, ĉe kiu li estis transportinta ĉiujn siajn kapitalojn por organizi al si alian kaj fiksan vivmanieron, li nenion plu posedis. Li tiam havis dudek jarojn.

Mortiga malsano lin frapis en amika familio kaj tre malfacile li estis savita. Ĉar tiu familio lin tre amis kaj li posedis diversajn diplomojn li fariĝis preceptoro (gubernisto) de la du filoj. Poste li ludis saman rolon de aliaj amikoj. Li do junulojn instruis dum dudeksep jaroj. Tuj kiam li komencis eduki, li kompreneble pli bone rimarkis kiel malfacile oni enigis lingvon en homan cerbon. La ideo, kiun li havis en Benares, revenis al li, kaj de 1875, en Septembro, li komencis multe serĉadi, pensadi kaj laboradi pri lingvo

internacia. Tago li instruis aŭ akompanis siajn edukatojn. Nokte li verkadis sian sistemon “L’ Adjuvanto” (l’auxilaire). La sistemo estis preta kiam ekbruis Volapük en Francujo en 1885. Restis nur por fari plenan vortaron (da 75 000 vortoj) franc-adjuvantan, ĉar la adjuvanto-franca ekzistis manuskripte kun gramatiko kaj dika libro da ekzercoj laŭ la du lingvoj. Konstantinte ke Volapük estis tre bedaŭrinda verkaĵo (kia ajn estas la bona intenco kaj eĉ la talento de ĝia aŭtoro), Sinjoro de Beaufront daŭrigis sian laboron. En 1888 li estis tuj dononta ĝin por la presado, kiam tute hazarde li legis la libreton de Doktoro Zamenhof kaj, kvankam ĝi estis tre elementa, ŝajnis al li ke la verko estas sendisputeble pli bona ol lia. “Aliflanke, kaj precipe,” diris li, kiam oni lin demandas pri tio, “mi saĝe memoris ke la kreaĵo de franco neniam sukcesis en Francujo, ke tre malfacile mi povus laŭdi mian propran verkon kaj, ĉar Esperanto estas mirinde parenca kaj simila al Adjuvanto, mi fariĝis Esperantisto.”

Pri la malfacileco de la komenco kaj la irado de l’ afero oni trovos sufiĉe la detalojn en artikolo de Sinjoro de Beaufront ĉe la marta, 1907-a, numero de *The North American Review*, sub la titolo, “Esperanto In France.”

En 1901 la progresoj fariĝis tiel grandaj ke “li devis forlasi ĉiun situacion, por sin okupi nur pri Esperanto. Ĉar li multege esperis antaŭe por la afero, lia decido estis preskaŭ freneza, ĉar nur liaj verkoj restis al li por doni la monon necesan al la pano ĉiutaga, kaj la revuo, “L’ Esperantiste”, lasas ankoraŭ al li plu ol 5 000 frankojn da perdo. Sed tamen li riskis “la lastan frenezaĵon”, diris li, ĉar li pretendas ke se ne estus en la mondo kelkaj frenezuloj de lia speco, la homaro atendus eterne la progreson. Kaj pri tia homo, kelkaj diris: “Lia fervoro por Esperanto estas nur fervoro por riĉiĝo!”

L’ESPERANTISTE

Organe propagateur et conservateur de la langue internationale Esperanto
REVUE OFFICIELLE DE LA SOCIÉTÉ FRANÇAISE POUR LA PROPAGATION DE L’ESPERANTO
et des Groupes Espérantistes français affiliés

La kapo de la unua paĝo de la gazeto de-beaufront-a.
Rimarku la vorton “conservateur” S-ro. de Beaufront ankoraŭ ĝi restigas.

Kiam oni demandas la markizon kial li ne edziĝis, li respondas: “Ĉar mi ne vendas min, nek mian nomon.

Cetere mi edziĝis de longe, en la tago kiam mi komencis okupi min je la lingvo Esperanto. En tiu tago mi prenis edzinon tiel absorbantan ke mi ne havis tempon por serĉi alian. Cetere kiu virino akceptus tiel malbonan edzon kiel min? Aliflanke per miaj edukitoj kaj per la esperantistoj mi havas tiom da infanoj ĉiulandaj, ĉiurasaj, eĉ ĉiukoloraj, ke mi ne bezonas aliajn.”

Fakto mirinda, multege korespondinte kun Doktoro Zamenhof dum deksep jaroj la markizo vidis lin nur en 1905, antaŭ la esperantista kongreso en Boulogne-sur-Mer. Tiu ĉi venis al li en Rouen, kie Sinjoro de Beaufront lin akceptis kuŝante sur kanapo, ĉar tiam li estis danĝere malsana pro troa laciĝado kaj li ne povis vidi tiun unuan kongreson de Esperanto, kie multfoje la kongresanoj aklamis kaj tondre aplaudis la nomon de “tiu dua patro de Esperanto”, kiel ili lin baptis.

Demandinte pri la ebleco de Esperanta kongreso en Usono, li formale respondis; “Certe; se niaj amikoj daŭrigos tie sian energian propagandon post tri-kvar jaroj, eĉ eble pli frue, Esperanta kongreso okazos baldaŭ ĉe ili. Pri tio mi plene konfidas kaj per ĉiuj fortoj mi puŝos al la sukceso de l’ afero. Ĉu jam la brazilaj esperantistoj ne havos la sian en la lasta Julio? La usonanoj donu la manon al Anglujo kiu tiel mirinde esperantiĝis kaj preparis al ni tiel belan kongreson en Cambridge, kaj rapide ĉiuj bezonantaj lingvon internacian sur la tero aliĝos al Esperanto.”

De kiu mi havas tiujn informojn tio devas resti sekreto; alie Sinjoro de Beaufront eble lin riproĉegus. Sed mi povas certigi la leganton, ke ili estas plej precizaj kaj la markizo mem ne povus diri, ke ili ne estas plene fidelaj kaj veraj.

Kompara Teksto.

ESPERANTO.

Metante antaŭ la okulojn kaj en la manojn de la personoj, kiujn vi volas altiri, tiujn nerifuzebajn dokumentojn pri la facileco kaj simpleco de Esperanto, vi preskaŭ ĉiam venkos iliajn ŝanceliĝojn.

ADJUVANTO.

Metante avan l’okuli ed en le mani di l’ personi, quin vu volas adtirar, ista nekontestabla dokumenti tuchan la facileso ed simpleso di l’ Adjuvanto, vu preske sempre venkos lia heziti.

L’ Adjuvanto ne estas presita, ĉar ĝuste kiam la markizo estis dononta ĝin al presisto, li konis Esperanton.

AMIKO AL USONO.



Noto de la Redakcio. Post kiam la supreprezita artikolo de amiko franca, kiu volas ke ni ne publikigu lian nomon, alvenis nin, kelkaj raportoj pri supozata malfideleco de S-ro. de Beaufront al Esperanto kaj al D-ro Zamenhof mem audiĝis kaj presiĝis, kaj oni eĉ kulpigis lin esti la aŭtoro de Ido, la “lingvo” kiun ŝajnas ŝati la Delegacio Por la Enkonduko de Helpa Lingvo Internacia, tial ke Ido kaj Adjuvanto similas iom. Responde al tiaj kulpigoj, S-ro de Beaufront anoncis en lia “L’ Esperantiste” lastan Oktobron:

“Oni kolportas la famon, ke mi penas, sub pseŭdonimo, enkonduki per la Delegacio sistemon, kiun mi oferis al Esperanto dum 1888. Mi do deklaras, ke l’ Adjuvanto nek ĝia aŭtoro neniam estis por io kandidatoj antaŭ la Delegacio kaj ke eĉ unu paĝo de mia sistemo ne eliris, de la jaro 1891, el la forta kofro de l’ notario, el kiu mi ĝin donis per esti post mia morto transigita al la plenumanto de mia testamento.”

L. DE BEAUFONT.”

Traduku!

traduku! • HOSS FIROOZANIA, Lee MILLER

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. Leginte viajn respondojn, ni faros resumon de la diversaj provoj, kune kun reagoj, komentoj, kaj proponoj.

Pasintjare ni proponis al vi mallongan versaĵon el la rakonto *A Literary Nightmare* de Mark TWAIN:

Conductor, when you receive a fare,
Punch in the presence of the passenjare!
A blue trip slip for an eight-cent fare,
A buff trip slip for a six-cent fare,
A pink trip slip for a three-cent fare,
Punch in the presence of the passenjare!

Refreno:

Punch, brothers! punch with care!
Punch in the presence of the passenjare!

Koran dankon al BS, SD, kaj ML, kiuj brave kaj kuraĝe alfrontis la taskon!

Neniam eblas konservi en tradukado *ĉiujn* trajtojn de originala verko; la tradukanto devas do zorge decidi, kiuj trajtoj estas ofereblaj, se necese, por savi la pli valorajn.

La dilemo fariĝas eĉ pli streĉa en tradukado de poezio, kie konkuras ne nur la prozaj trajtoj (ekz. senco kaj tono) sed ankaŭ trajtoj *sonaj* – ekz. rimo, ritmo, aliteracio, kaj asonanco. Eble pro tiu aparte granda defio, tradukistoj de poezio ŝajne sentas sin aparte liberaj; iliaj solvoj povas esti same diversaj kiel la tradukistoj mem.

Tia diverseco bone evidentiĝas en la tri belaj proponoj, kiujn ni ricevis. Tute ne eblas fari sintezon el ili, do ni prezentas ĉiun aparte:

Traduko № 1 (BS)

Kiam vi, konduktor', veturprezon ricevos
Frato, trui bileton koloran vi devos
Por ok-cenda vojaĝo, la bileton bluan
Kaj por la ses-cenda, bileton flavbrunan
Rozkoloran, por sumo de tri-cenda kvanto
Kaj truu ĝin antaŭ l' ekvojaĝanto!

Refreno:

Fratoj, truu bileton! Estu zorgaj pri l' afer'!
Truu en ĉeesto de la pasaĝer'!

Ni admiras la kuraĝan laboron de la tradukinto por konservi kaj sencon kaj stilon de la originalo. Bedaŭrinde la ritmo ne fluas tre glate; deklamante ĝin, ni devas rezigni pri la “lokomotive” regula takto de la originalo.

Traduko № 2 (SD)

Fratoj konduktoroj
Faru tion ĉi
Truu la bileton
Same kiel mi

Cendoj ok por blua
Ĉamkolora, ses
Cendoj tri por roza
Faru ĝuste, jes!

Refreno:

Truu fratoj, truu
Laŭ la prez kolor'
Antaŭ pasaĝeroj
Estu en favor'.

Ĉi-kaze la tradukinto simpligis la versaĵon, kreante ion vere malsaman – kaj ritme, kaj rime. Laŭ niaj oreloj, la rezulto estas ĉarma kaj memorinda; ĝi donas similan impreson kiel la originalo, eĉ per malsimila formo.

Eble notinda estas la uzo de nombrovortoj post la aferoj, kiujn ili nombras. En prozo, tiu “inversa ordo” normale **montras ne nombron, sed numeron**

<<https://bertilow.com/pmeg/gramatiko/nombroj/vortetoj/uzado.html#i-68a>>, ekz. komparu *tri paĝoj* (nombro) kun *paĝoj tri kaj kvar* (numero). Sed en poezio oni ofte streĉas la gramatikon, do laŭ ni la nombra uzo ĉi tie estas tute en ordo.

Traduko № 3 (ML)

Konduktoro, kiam venos pag',
Trui la slipon, jen la ĝusta ag'.

La blua voj' por ok-cenda pag',
La bruna voj' por ses-cenda pag',
La pinka voj' por tri-cenda pag',
Montru la truadon, jen ĝusta ag'.

Refreno:

Truu zorge, per via ag'
Oni fidon vin pri la ĝusta pag'.

Tiu ĉi traduko bone konservas la originalan rimaranĝon, sed je kosto de malsama kaj iom neregula ritmo.

Analizo de la originala versaĵo

Unue, ni traktu kelkajn interesajn vortojn, frazojn, kaj parolturnojn:

Punch! – ĉiuj elektis *trui*. Kaj prave: kontrolinte trajnbileton, konduktoro faras truon en ĝi (per unika truilo).

in the presence of the passenger – unu uzis *antaŭ l' ekvojaĝanto*, kiu ŝajne kaptas la ĝustan sencon. La aliaj preterlasis la frazon.

passenjare – iu demandis, ĉu entute eblas konservi tian komikan vorton. Kompreneble ĝi reprezentas intencan misprononcon, por ke *passenger* rimiĝu kun *fare* kaj *care*. Eble oni povus simile mistordi vorton en Esperanto, sed verŝajne la laboro ne valorus la penon, kaj la rezulto estus verŝajne tre konfuza. Neniu el la tradukintoj konservis tiun detalon.

buff – *bruna, flavbruna*. Plej plaĉas al ni la elekto de SD, *ĉamkolora*.

trip slip – jen en-versa rimo kiu bele utiligas la unusilaban koncizecon de la angla. Estas malfacile reprodukti ĝin en lingvo kiu emas al plursilabaj vortoj. Nesurprize, neniu provis konservi ĝin.

Ĉu finfine iuj el tiuj vortoj kaj esprimoj estas konservendaj? Eble ne. Efektive, neniu el ili multe gravas en la rakonto; multe pli gravas la ritmo kaj sono de la versoj, kiuj senescepte dependigas kaj frenezigas siajn legantojn. (Nu, almenaŭ se temas pri la fikciaj legantoj en la rakonto; ni esperas, ke *vi* ne frenezigiĝis!)

Do, estus bone konservi la ĝeneralan sencon de la

versaĵo, certe (ekz. pri konduktoro, trajno, biletoj), sed laŭ ni, plej gravas la *ritmo*.

La originala ritmo

Foje en poezio, aparte en la tradiciaj formoj, oni povas apartigi sonojn en pli-malpli regulan aranĝon de ritmaj *piedoj*, aŭ grupoj de silaboj akcentaj (/) kaj senakcentaj (x). Ekzistas pluraj specoj de tiaj piedoj: jambo (x/), trokeo (/x), daktilo (/xx), anapesto (xx/), amfibrako (x/x) kaj pli. Ekzemple, jen parto de la zamenhofa poemo *Mia penso*, kiu uzas versojn *kvartrokeajn*; alivorte, ĉiu verso havas kvar trokeajn piedojn (/x /x /x /x):

/ x / x / x / x
Sur la | kampo, | for de l' | mondo,

/ x / x / x / x
Antaŭ | nokto | de so- | mero

/ x / x / x / x
Ami- | kino | en la | rondo

/ x / x / x / x
Kantas | kanton | pri l' es- | pero

Kontraste, en la versaĵo de nia defio, ne ekzistas simpla maniero dividi la akcentojn en regula aranĝo de piedoj:

x / x / x x / x /
Conductor, when you receive a fare,

/ x x / x x x / x /
Punch in the presence of the passenjare!

...

/ / x / x /
Punch, brothers! punch with care!

En deklamado de la versaĵo okazas tamen io interesa: foje la versfinoj ritme apartigas sin de siaj versoj, gluiĝante al la komenco de la sekvaj. Kaj la longeco de la silaboj varias, por ke ĉiu verso finfine havu regulan ritmon. La akcentoj sonas laŭ la ĉefaj pulsoj de la muzika takto 4/4, kvazaŭ en ia rultambura marŝado militista.

Efektive, ni faris el ĝi partituron por rultamburo. Jen nia provo, kiun vi povas ankaŭ aŭskulti en nia retejo. La akcentojn markas angulaj krampoj (>) super la battoj:

mf
Conductor when you receive a fare,
Punch in the presence of the passenjare! A
blue trip slip for an eight-cent fare, A
buff trip slip for a six-cent fare, A
pink trip slip for a three-cent fare,
Punch in the presence of the pass-enjare!
Punch, bro-tthers! Punch with care!
mf Punch in the presence of the passenjare! *ff*

Kelkaj aliaj provoj

Se plej gravas regula ritmo, kion oni povas fari? Ni faris kelkajn aliajn provojn por via (ebla) amuzo:

Tute alia ritmo kaj rimaranĝo

Kiel faris SD, eble oni elektu ritmon pli konvenan al Esperanto. Jen unu provo kiu uzas aleksandrojn (x/ x/ x/x, x/ x/ x/[x]). Ĝi retenas iom de la originala senco, kaj donas regulan ritmon. Sed bedaŭrinde, tiu ritmo ne vere taŭgas por marŝo.

Post pag' de pasaĝero, ho kara konduktor',
vi vendu trajnbiletojn, sed ĝuste laŭ kolor':
Ok cendojn oni pagu por blua trajnbilet'.
Nur ses la flava kostas, ĝi estas bonaĉet'!
Kaj laste jen la ruĝa, tri cendojn kostas ĝi.

En ĉiun faru truon, memoru zorge vi!
Do vendu trajnbiletojn, sed ĝuste laŭ kolor',
Post pag' de pasaĝero, ho kara konduktor'!

Rime kaj ritme fidela(?)

Ĉi tie ni provas konservi la monotonajn vers-finajn rimojn, iom de la en-versa rimo (kiel en *trip slip*), kaj marŝan ritmon tre proksiman al la originalo. Malfeliĉe, la rezulto sonas al ni iom peza:

Por konduktor', jen la rekomend':
Bileton truu vi sen ajna plend'!
Bileton bluan por dek-cenda vend'
Bileton flavan por ok-cenda vend'
Bileton ruĝan por du-cenda vend'
Nepre truu ĝin sen ajna plend'!

Refreno:

Truu, fratoj, sen atend'!
Bileton truu vi sen ajna plend'!

Fidela ritme, sed ne rime

Fine ni provas konservi nur la ritmon pli-malpli fidele, oferante iom da senco, kaj tute ŝanĝante la rimaranĝon. Ĉu sukcese? Vi juĝu.

Ho konduktoro, jen l' afer'
Truu bileton por la pasaĝer'!
Bileton bluan por ok-cenda vend',
La flavan truu nepre sen atend'.
La ruĝan truu kontraŭ cendoj tri.
Truojn faru vi en ĉiuj ĉi!
Truu, fratoj! Jen l' afer'!
Truu bileton por la pasaĝer'!



Nova defio el *Mary Poppins*

Jen via nova tradukdefio. Ĝi venas el *Mary Poppins* de P.L. Travers. (New York: Harcourt, Brace & World, Inc., 1934, 1962. pp. 10-11):

As it did not seem as though Mary Poppins were going to say any more—though she sniffed a great deal—Jane, too, remained silent. But when she bent down to undo her bag, Michael could not restrain himself.

"What a funny bag!" he said, pinching it with his fingers.

"Carpet," said Mary Poppins, putting her key in the lock.

"To carry carpets in, you mean?"

"No. Made of."

"Oh," said Michael. "I see." But he didn't—quite.

By this time the bag was open, and Jane and Michael were more than surprised to find it was completely empty.

"Why," said Jane, "there's nothing in it!"

"What do you mean—nothing?" demanded Mary Poppins, drawing herself up and looking as though she had been insulted. "Nothing in it, did you say?"

And with that she took out from the empty bag a starched white apron and tied it round her waist. Next she unpacked a large cake of Sunlight Soap, a toothbrush, a packet of hairpins, a bottle of scent, a small folding armchair and a box of throat lozenges.

Jane and Michael stared.

"But I *saw*," whispered Michael. "It *was* empty."

"Hush!" said Jane, as Mary Poppins took out a large bottle labelled "One Tea-Spoon to be Taken at Bed-Time."

A spoon was attached to the neck of the bottle, and into this Mary Poppins poured a dark crimson fluid.

"Is that your medicine?" enquired Michael, looking very interested.

"No, yours," said Mary Poppins, holding out the spoon to him. Michael stared. He wrinkled up his nose. He began to protest.

"I don't want it. I don't need it. I won't!"

But Mary Poppins's eyes were fixed upon him, and Michael suddenly discovered that you could not look at Mary Poppins and disobey her.

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 25-a de Junio**. Bonvolu sendi **nur unu** version, ne plurajn diversajn provojn.

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.